

Johann Wolfgang von Goethe,

## La rozeto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Knabo vidis – jen rozeto  
Sur la kampo staras;  
Bela, juna la floreto . . .  
Vive kuras la knabeto,  
Ĝojas, miras, flaras.  
Sur la kampo la rozet’  
Kiel infanet’.

Knabo diris : « mi eltiros  
Belulinon mian »;  
Floro diris : « vi foriros, –  
Per pikiloj mi disŝiros  
Tuj la manon vian ».  
Sur la kampo la rozet’  
Kiel infanet’.

La sovaĝa knab’ ridante  
La rozeton prenis, –  
La floreto batalante  
Sin defendis pikadante,  
Sed la sorto venis.  
Sur la kampo la rozet’  
Kiel infanet’.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1022-2070 (2014-05-23  
12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en  
<http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.

Johann Wolfgang von Goethe,

## Knab’ rozeton vidis li

*tradukita de Joachim Gießner*

Knab’ rozeton vidis li;  
erikeja floro.  
Juna, bela estis ĝi.  
Por admiri kuris li  
ĝoje kun adoro.  
Rozo, rozo, ruĝa roz’,  
erikeja floro.

Diris knab’: „Mi rompos vin,  
vi rozeta floro“.  
Diris roz’: „Mi pikos vin,  
ke vi ne forgesos min,  
premas min doloro.“  
Rozo, rozo, ruĝa roz’,  
erikeja floro.

Knab’ sovaĝa rompĉin;  
erikeja floro.  
Rozo ja defendis sin  
kaj sufere pikis lin,  
ne utilis ploro.  
Rozo, rozo, ruĝa roz’,  
erikeja floro.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-1022-2225 (2014-12-16  
16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en  
<http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Johann Wolfgang von Goethe,

## Roz’ sur erikejo

*tradukita de Konrad Matheus*

Vidiĝis eta ruĝa roz’  
de knab’, sur erikejo.  
Ĝi belis en matena ros’.  
Hastis li al juna ŝos’  
admiri ĝin kun ĝojego.  
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,  
roz’ sur erikejo.

Diris knab’: “Mi rompos vin,  
rozo sur erikejo.”  
Diris roz’: “Dorn’ pikos vin,  
por ke vi ne forgesu min.  
Al mi ne estu sufero.  
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,  
roz’ sur erikejo.

Kaj knab’ sovaĝa rompĉin,  
rozon sur erikejo.  
En defend’ roz’ pikis lin.  
Sed ve’ kaj aĥ’ ne helpis ĝin.  
Venis sort’ sen tolero.  
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,  
roz’ sur erikejo.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.*

Arg-1022-2227 (2014-12-17  
13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en  
Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim,  
Germanio.